

Eŭropa Bulteno

Februaro 2016, Numero 157

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2015

Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco plu ekzistis en 2015 kaj en ĝi nun estas EEU kaj E@I kun kune 4 membroj, sed bedaŭrinde ĝi pasiviĝis kaj okazis neniu kunsido. Ŝajne pro manko de mono kaj prisilentita subteno al la tendencoj venkigi unulingvecon. Bedaŭrinde, en tiu nura loko kie ni havas oficialan statuson kadre de EU-aj institucioj, eblis fari nenion.

En komenco de 2015 EEU zorgis pri lastaj devoj rilate la grandegan projekton financatan de EU ellabori portalon „lingvo-info”, nome ellabori finan raporton kaj financan raporton, baze de kiu oni povis ricevi lastan parton de la mono kaj fini oficiale la projekton. Tion faris ĉefe nia direktorino Maja Tišljär kun multaj problemoj ĉar ne ĉiuj partneroj tre bone gvidis siajn administrajn dokumentojn (estis entute 9 partneroj), sed fine ĝis la limdato ŝi sukcesis ekspedi la tuton ĝustatempe. Dank’ al la bona raporto la kontrolistoj taksis la raporton tre pozitive (8 inter 10 maksimumaj punktoj) kaj estis pagita la la lasta sumo. Tial ankaŭ EEU havas fine de la jaro 2015 pozitivan financan bilancon, kvankam en tiu ĉi jaro ne estis aprobita iu ajn nova projekto. La portalo lingvo.info funkcias nun kiel granda informejo en 24 lingvoj pri ege multaj aspektoj de lingvaj demandoj inkluzive pri konkretaj informoj pri 28 eŭropaj kaj kelkaj gravaj neeŭropaj lingvoj. De la komenco de 2015. jaro vizitis ĝin jam preskaŭ 300.000 homoj, kiuj interalie povis vidi ke en ĝi Esperanto estas unu el normale traktataj lingvoj (troviĝas priskriboj pri ĝi kaj la tuta portalo estas legebla ankaŭ en Espeanto). Ĝi estas atingebla ĉe <http://lingvo.info/eo/>.



Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj EEU dissendi inviton al la landaj asocioj prifesti ĝin kaj aperigi siajn manifestaĵojn dediĉitajn al ĝi en la granda portalo de Eŭropa Konsilio kaj efektive tion faris 15 asocioj kaj societoj en Eŭropo.

Maja kaj Zlatko Tišljär ellaboris komence de la jaro 3 projektojn por financado de EU ĉe Eŭropo por Civitanoj. Bedaŭrinde neniu estis akceptita kaj fine de la jaro ili komencis plani skribi pli da projektoj

ĝis la limdato en marto 2016.



La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj asembleaj membroj partoprenis en kelkaj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj kunsidoj diverstipaj. Aparte elstaris la laboro de Jozef Reinart kaj Petro Baláž en Slovakio. Ili havis plurajn renkontiĝojn kun politikistoj en Slovakio preparante la realigon de UK

en Nitra kaj internacia lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj ŝtatoj kadre de UK 2016. Detale pri tio vi povas legi en la artikoloj de Jozefo Reinart en Eŭropa Bulteno de junio-julio kaj de decembro 2015. La estraro ankaŭ zorgis pri preparo de nia pezentiĝo ĉe la Eŭropa Forumo en Krynica (Pl) klopodante kiel kutime trovi kelkajn gravajn politikajn personojn kiuj kadre de EEU-prezentiĝo partoprenus en podia diskuto, sed lastmomente la organizantoj forigis la podian diskuton, sed tamen estis farita granda laboro diskutante kun pluraj politikistoj de Pollando kaj Slovakio pri tio. En la junio-julia numero estas legebla ankaŭ detala raporto de nia prezidanto pri la plej grava atingajo je tiu politika nivelo en 2015, nome ke li estis akceptita la 9-an de julio de eŭropa komisionano pri sano Vytenis Andriukaitis (litovo), do unu el 28 ministroj de EU. Ili diskutis pri E-temoj kaj la komisionano akceptis inviton prelegi en la lingvo-politika konferenco organizata de UEA kaj EEU en 2016 en Slovakio. Konstatiĝis nome, ke li lernis E-on en juneco kaj subtenas la E-movadon.

Maja Tiŝljar partoprenis en Berlino en Expolingua kie ŝi prelegis pri nia projekto lingvo.info por ĝenerala publiko la 18-an de novembro.

Peter Baláž prezentis nin dum la Somera E-Studado (SES) en Martin kaj Zlatko Tiŝljar prelegis dum la 3-a Monda Kolokvo pri E-instruado en Neuchatel (Svislando) kaj dum la E-verkista renkontiĝo en Hrašćina (Kroatio).

Flory Witdoeckt estis unu el la ĉeforganizantoj de la monda Kongreso de ILEI en Oostende kaj nia reprezentanto en ĝi.

Elstaris ankaŭ ĉi-jare kvalita aktiva partopreno en la 25-a Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu refoje estis organizita tre videbla stando de EEU, apud kiu pasadis dum la 3 tagoj (8-10. sept) pli ol 2000 partoprenintaj forumanoj inter kiuj ŝtatestroj, gravaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj kaj pli ol 400 ĵurnalistoj. Kiel jam menciite ĉi-okaze kiam EEU partoprenas jam la 10-an fojon, ne okazis paneldiskuto. Tamen la polaj helpantoj organizis ankaŭ sukcesan kulturen aranĝon: koncerton de Junaj Voĉoj el proksima urbo Nowy Sacz. Ankaŭ ĉi-okaze grandan dankon al nelacigebla Halina Komar, sen kiu tiu partopreno ne estus ebla.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:

En mezo de 2015 startis nova reta E-kurso kadre de granda portalo duolingo. Ellaboris ĝin teamo de junaj fakuloj (adaptis la softvarojn kiuj jam funkcias por lerni plurajn lingvojn en Duolingo) gvidataj de Chuck Smith. Ĝis la jarfino la kurson komencis uzi pli ol 230.000 lernantoj kaj tio estas la plej granda tiaspeca instrusukceso de Esperanto ĝis nun.



2017 estos ankaŭ Zamenhof, kadre de oficiala rekomendo de UNESCO al ĉiuj landoj en la mondo.

Grupo da entuziasmuloj, ĉefe el Pollando sub la gvido de Halina Komar sukcesis transdonigi far Pola Registaro proponon al UNESCO rekomendi Zamenhof kiel monda kulturgravulo okaze de 100-jariĝo de lia morto en 2017 kaj tiu iniciato respeguliĝis en novembro per sukceso ĉar UNESCO akceptis tiun proponon kaj inter ĉirkaŭ 100 personecoj gravaj por la mondo prifestataj en

Instigita de polaj esperantistoj, kiuj sukcesis en 2014 atingi oficialan statuson de Esperanto kiel nacia kultura heredaĵo, Kroata E-Ligo kolektis necesan materialon por peti la saman oficialan statuson kaj fine de la jaro transdonis ĝin al Kroata Ministerio por kulturo.

Speciale interesa fenomeno en kiu parte partoprenas EEU sed ankaŭ stimulas ĉiujn aliajn E-organizaĵojn estas respektinda nombro da projektoj financataj de EU kiujn ellaboris kaj projektis E-organizaĵoj aŭ al E-ligitaj entreprenoj. En 2015 krom en la projekto lingvo.info kun 8 partneroj sukcese estis organizita 1 projekto kadre de Grundtvig en kiu partoprenis partneroj en Germanio, Pollando kaj aro da projektoj gvidataj de E@I en kiuj partoprenas ankaŭ Studio Gaŭs el Germanio, Asocio por Eŭropa Konscio el Maribor.

Menciindas ankaŭ grava laboro en Litovio kie la vicprezidanto de Litova Parlamento akceptis la prezidanton de LEA kiuj parolis pri la E-agado.

Sur la plano de e-instruado estis kreita gravega bazo por povi konstrui instrumaterialon por havi kursojn pri elĉerpaĵo de Esperanto por etaj infanoj kiel katalizilo por rapidigi postan instruadon de fremdlingvoj. Nome Raymond Gerard (Remuŝ) el Belgio kreis softvaron kiu bonege kapablas aŭtomate dismeti kiun ajn skribitan E-tekston je morfemoj per kiu eblas rapide nombri kaj montri oftecon de morfemoj en E-tekstoj. Per nombrado de libraj tekstoj kun 2 milionoj da vortoj pli-malpli konfirmiĝis la antaŭa esploro pri tio de Zlatko Tišljar kaj konstruiĝis Baza Listo de morfemoj, nun definitive science konfirmita materialo instruenda al infanoj por la propedeŭtikaj celoj.

Enmovada Agado

En 2015 la ĉefaj administraj devoj estis organizitaj kadre de la jubilea 100-a Universala Kongreso en Lillo (Francio), kie okazis du kunsidoj de la asembleo kaj unu kunsido de la estraro de EEU. La ferma kunsido de la asembleo kun 14 asembleanoj traktis la raportojn kaj aprobis ilin kaj tuŝis la planojn por 2016. Ankaŭ ĝi decidis pri nova kotizsistemo kiun ekde tiam aplikas EEU. Nome nun ekzistas 4 kategorioj de kotizoj, depende de la riĉo de la landoj kaj sekve ankaŭ meza pagokapablo de la tiea membraro de E-asocioj. En la plej riĉaj landoj restas la kotizo: unu eŭro po membro kaj poste sekvas kategorioj de 0,75, 0,50 kaj 0,25 eŭroj. En la malferma kunsido partoprenis pli ol 150 personoj – interesitoj pri la eŭropa E-movado, membroj de la UK. E ĝi oni raportis pri la projekto Lingvo.info, prezentis la agadon de EEU, proklamis du novajn honorajn membrojn de EEU (Flory Witdoeck kaj Zlatko Tišljar) kaj



estis proklamita gajninto de la premio Cigno por la plej aktiva Landa asocio sur la kampo de ekstera informado (ĈEA). Ankaŭ estis kolektitaj subskriboj de tiuj kiuj pretas aĉeti libon pri la Eŭropa E-movado, kiun EEU planas eldoni. Estis kolektita kontentiga nombro de subskriboj.

Dum la UK okazis ankaŭ unu kunsido de la estraro, kiu

preparis la assembleajn kunsidojn kaj traktis la financojn.

EEU-estraranoj, ĉefe Flory Witdoeckt kaj Seán Ó Riain deĵoris dum la Movada Foiro ĉe la stando de EEU informante pri niaj agadoj. Flory Witdoeckt partoprenis ankaŭ en la laboro de UEA-Komitato kaj Zlatko Tišljar en la Eŭropa Komisiono de UEA.

Iom antaŭ la UK Flory Witdoeckt kun helpo de EEU eldonis kompaktdiskon kun Eŭropa himno kantata de Ostendea koruso en Esperanto kaj komencaj kun tonoj de ĉiuj himnoj en EU akompanataj de adekvataj fotoj pri la koncernaj landoj. Tre reprezenta KD por diversaj okazoj, kiam ni volas monti kvalitajn kontribuojn de esperantistoj al ekstera mondo.

Kelkaj membroj de la estraro, aparte la prezidanto, aktive zorgis pri reagoj en neesperantistaj debatoretoj kie la multlingvismo estis traktata. Li kaj multaj aliaj eŭropaj esperantistoj aparte multe kontribuis al tia debato starigita ĉe Debating Eŭrope.

EEŬ startis kampanjon inter LA-oj ke ĉiu el ili klopodu proponi al adekvataj instancoj proklami Espernton kiel kulturheredaĵo de la koncernaj landoj laŭ la pola modelo, kiun jam sekvis kroatoj.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (junia-julia numero estis komuna) ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu. Kopie ĝi aperas ankaŭ en la retejo de Remuŝ.

La kunlaboro kun UEA estis bona kiel kutime: Niaj reprezentantoj ĉeestis en kelkaj aranĝoj de UEA (malfermaj tagoj de UEA, en la komitatkunsidoj kaj komisionoj de UK en Lillo, en la laboro de Eŭropa Komisiono de UEA) kaj kunorganizis kun UEA (kiu helpis finance) la partoprenon en Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando). Petro Balaž verkis artikolojn por UEA-revuo Esperanto-Revuo kaj en ĝi estis intervjuata.

La landa agado estis kontentiga. Ni invitis la landojn al kelkaj iniciatoj okaze de la Eŭropa Lingva Tago kaj kampanjo klopodi proklami en siaj landoj Espernton kiel kulturheredaĵo. Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tišljar.

Iom da problemoj estis kun la Hispana E-Federacio kies prezidanto daŭre malakceptas pagi kotizon pro lia malkonsento pri la politiko de EEU, kiu interalie celas proponi E-on kiel

Eŭrop-Unia lingvo. Pri tio okazis polemiko en Eŭropa Bulteno. La problemo ne estas ankoraŭ solvita.

Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2015. Estis ankaŭ baze prizorgata la retpaĝaro de EEU. Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tišljär, Flory Witdoeck kaj Zlatko Tišljär. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2016-a jaro kiu aperis en la novembra numero de EB.

Maja Tišljär partoprenis en unu kunveno de agentejo EACEA de Europa Komisiono rilate financadon de neregistaraj organizoj.

Financoj

La kotizpagado en 2015 estis bona ĉar pagis plimulto de la asocioj eĉ malriĉaj kiel Rumanio, Grekio, Malto, sed ne pagis la plej grandaj kiel la Franca, Itala, Germana, Hispana, Pola, Hungara, Portugala kaj Litova Asocioj. Pri tio ni intensigis kontaktojn en la fino de la jaro, kio ŝajne bone solviĝos en 2016 (krom en la kazoj de Hispanio, kiu ignoras la devon kaj Pollando, Hungario, Portugalio kaj Litovio, kiuj insiste silentas).



La jaro finance estis, malgraŭ tio ke jam la duan jaron estis aprobita al ni neniu nova projekto, bona, ĉar ni ricevis finan parton de la finiĝinta projekto Lingvo-info kaj dank' al malavaraĵoj donacoj de kelkaj individuoj kaj asocioj por la sama projekto. La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj. Finance kontribuis al EEU ankaŭ UEA kaj ESF por la bonege realigita partopreno en 25-a Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando).

Flory Witdoeck ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2014 kaj por la asembleo en Lillo. Ni sukcesis pluteni la profesion laboron de Maja Tišljär (kiu ricevas salajron en Germanio, kie ŝi loĝas pro kontrakto inter EEU kaj GEA). Tio tre gravas, ĉar la kondiĉo por ricevi financadon kaj pli grandajn projektojn estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tišljär, sekretario de EEU

PLENUMITA ENORMA LABORO

Mi volus informi la legantojn, ke matene la 1-an de marto, kiam estis la fina limdato por transdoni novajn projektproponojn baze de la konkurso de la EU-Programo: Eŭropo por Civitaĵoj, sukcese finiĝis la unua fazo de nia agado cele al financa fortigo de EEU. En tiu programo EEU havas la plej grandan ŝancon ricevi subtenon. La sekva ebleco estos nur post unu jaro.

Ĉar ĉi-jare la konkurskondiĉoj estis iom pli konvenaj por tiuj kiuj konas Balkanion (unu el la celoj de la konkurso estas subteni agadojn kiuj traktas memore al historiaĵoj kiujn necesas



daŭre trakti kaj kondamni - la 25-jariĝon de la komenco de la milito en Eksjugoslavio. Pro tio Maja kaj mi decidis jam en decembro ellabori laŭeble multajn projektojn ĉi-foje. Kaj ni efektive laboregis dum la du monatoj. Unue ni pripensis bazajn ideojn por projektoj kaj poste distribuis tion al fina prilaboro laŭ la formularoj de EU-konkurso. Estis por mi pli ol 200-hora laboro kaj por Maja preskaŭ same. Same multe kunlaboris ankaŭ alia Maja, Maja Cimerman el Slovenio. Ni triope (kaj la finan rolon en la afero havis

Maja Tišljar, ĉar kun ŝiaj konoj de la administrado kaj politikoj de EU ŝi multe pli bone ol ni du scias poluri la finajn versiojn de la projektoj) ellaboris 8 projektojn kun budĝeta valoro de pli ol 800.000 eŭroj kiujn Maja sukcesis plusendi al EU ĝustaempe post tutnokta laboro.

En tiuj 8 projektoj 7-foje EEU havas aŭ rolon de ĉeforganizanto aŭ de partnero kaj ni estas tre optimismaj pri tio, ke almenaŭ unu el tiuj projektoj estos sukcesa kaj ke ni fine ricevos monon por pluteni nian asocion dum unu aŭ du jaroj.

La projektoj estis skribitaj en kvar lingvoj: tri en la angla, tri en la kroata, unu en la slovena kaj unu en la germana. La rezultoj estos publikigitaj en junio aŭ julio kaj tiukaze la starto de la projektoj estos en oktobro. Tiam ni esperantigos detale nur tiu(j)n projekto(j)n sukcesa(j)n, ĉar ja ĉiuj partneroj devas scii pri kio temas kaj kion ili devas fari. Cetere, granda laboro estis investita en interkonsentadon kun potencialaj partneroj - en ĉiuj 8 projektoj rolas 12 diversaj partneraj organizaĵoj inter kiu 10 estas tiaj en kiuj aktivis kaj laboras esperanistoj.



Mi krome volas atentigi tiujn kiuj ne plene tion komprenas ke sen havi alte kvalifikitajn profesiulojn kun amaso da specifaj scioj (kono de eŭropaj politikoj kaj evolutendencoj, kono de la financprogramoj kaj administrado kaj tre bona kono de minimume du grandaj lingvoj por povi verki en ili, kaj havi vastajn konojn en diversaj sciencoj) kiuj povas dediĉi tiom da tempo en la ĝusta tempo (tiam kiam estas la konkursoj) tio ĉio ne estas ebla kaj ke ĉiu politiko kiu ne pensas pri tio ke ĝi devas krei kondiĉojn por en la

organizo havi profesiulojn (do, monon por iliaj salajroj) ne povas konduki al tre sukcesa kresko.

Nia Maja, kelkaj homoj en Berlino kaj E@I estas tiaj alte kvalifikitaj profesiuloj, kiuj interalie ŝatas subteni Esperanton. Ili konas la projektlaboron, la eŭropajn politikojn kaj bonege regas minimume du mondajn lingvojn. Kiam ni ne zorgos pri niaj profesiuloj, nia laboro ne plu havos seriozajn perspektivojn.

Zlatko Tišljar

LA FRANCA ESPERANTO-KASTELO GRÉSILLON INVITAS VIN LERNI KAJ FERII



8a - 16a de aprilo 2016: PRINTEMPaS, intensaj kursoj kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1): <http://gresillon.org/printempas>

20a – 24a de aprilo 2016: Korusa renkonto de Interkant' kaj verkadateliero Krajon'-Ankro:
<http://gresillon.org/koruso>

12a – 17a de junio 2016: La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj:
<http://gresillon.org/s1>

4a – 15a julio 2016: Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto:
<http://gresillon.org/s2>

6a – 13a de aŭgusto 2016: SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO: <http://gresillon.org/s3>

21a – 28a de aŭgusto 2016: Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj:
<http://gresillon.org/s4>

Kontakto: kastelo@gresillon.org, <http://gresillon.org/kontakto>, +33-241891034

Berto Ŝuman

ESPERANTO POR VIA FLUG-SEKURECO

Laŭ la statistikoj nun iom pli ol 11 elcento de la aviadilaj akcidentoj okazas pro miskomprenoj inter pilotoj kaj flug-kontrolistoj. Ĉu Esperanto povus helpi?



Dum la 3-a jarmilo post cent jaroj de flug-
trafiko ni riskas perdi vivojn pro
miskomprenoj en lingvo ne taŭga, ĉu tio
estas ridinda aŭ plorinda? Jam en 1910
Ernest Archdeacon kaj Henri Farman,
grandaj pioniroj de aviado kaj de Esperanto,
deklaris, ke “la daŭra progreso de la
transport-rimedo en internacia lingvo
simpla estas absolute necesa.” Bedaŭrinde
en 1951 la Federa Instanco Aviada (FAA)

devigis sen ajna scienca pruvo la organizaĵon OACI alpreni la anglan kiel mondan lingvon de
aviado. En tiu epoko la aviadiloj por pasaĝeroj, relative malgrandaj, malrapidaj, funkciaj
per helico, ne estis multaj, sed nuntempe la flughavenoj estas plenigitaj per jet-aviadiloj tre
rapidaj, gigantaj.

La komunikado devas okazi rapide kaj sekure, daŭre kaj precize. Ĉiuj aviadistoj devas kompreni la instrukciojn sen duboj, en la tuta mondo, sendepende de ilia gepatra lingvo. Ne nur lingvo internacia, monda estas necesa sed ĝi devas esti ankaŭ pli klara kaj relative facila. La lingvo, kiu plej respondas al ĉi tiuj kondiĉoj estas Esperanto.

Kial la angla lingvo ne taŭgas?

Unue, kiun el la multnombraj anglaj lingvoj oni devas lerni? Ekzemple la usona esprimo por enpoziciĝo estas “put into position” dum en la internacia angla oni diras “line up”.

Due, kiu, krom denaskuloj, kapablas elparoli 42 sonojn skribitajn per malsimpaj kunmetaĵoj de 26 literoj?

Trie, kvare kaj eĉ pli da dubindaĵoj kiel ekz. multnombraj neregulaj verboj baras la vojon al kompreneco, same kiel fiksitaj esprimoj, ktp.

Ne estas, do, mirinde ke la usona televidstacio NBC raportis pri 345 miskomprenoj, akcidentoj kaj preskaŭ-akcidentoj kaŭzitaj de lingvaj problemoj ek de 1988 kaj rilataj al usonaj pilotoj mem. Inter ĉi tiuj akcidentoj 95 okazis en Usono kaj 250 eksterlande. Sed kiom da konfuzo okazis en la mondo, kie oni ne parolas la anglan sed estas devigata uzi ĝin? La plej katastrofa akcidento, kie mortis 583 homoj (Tenerifo 1977), estis kaŭzita de nederlanda piloto, kiu ne komprenis frazon en la angla senditan de la kontrol-turo.

Nia alvoko al la Esperanto-komunumo kaj al UEA kiel kupola organizaĵo estas, ke ni bone konsideru ĉi tiun problemon kaj prezentu al la mondo kaj al la oficialaj organizaĵoj pri aviado, kiel FAA, ICAO kaj IATA (Asocio de aviadaj internaciaj transportoj) la solvon, kiun Esperanto povus alporti al ĉi tiu praktika kaj aktuala labor-kampo.

Ekzemple antaŭ kelka tempo en Moskvo piloto de Airbus kaj rusa kontrolisto ne sukcesis interkompreniĝi per la angla, kaj moskva vojaĝintino surterigis la aviadilon. Poste la piloto diris ke tio okazas ofte. Alia ekzemplo: en Osaka, la ĉina piloto ne komprenis la anglan de la japana kontrolisto, en Francio okazis same, mi aŭdis en France Info dum 2 minutoj unu foje matene, kaj en vojaĝoj de turismaj aviadiloj kiuj transportas 4, 6 vojaĝantojn, tio okazas ofte, sed plej ofte oni ne raportas pri tio.

Elisabeth LAMBERT

animanto de la labor-grupo Esperanto-en-aviado,

30-AJ ESPERANTAJ TAGOJ DE KRAKOVO

Krakova Societo ESPERANTO prepariĝas al jubileaj 30-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo dum tagoj 3 – 5.6.2016. Nia organizaĵo planas, kiel kutime, abundan nombron da diversmaj prelegoj, koncertoj, aktoraj elpaŝoj kaj ekskurson tra Krakovo. Ni certigas agrablan etoson, eblecon manĝeti kaj (d)trinketi surloke, lokon por babili, interesan enhavon de la stando kun aĉetendaj libroj kaj modestan koston de aliĝilo (10 zł.; aliaj kostoj pagendaj aparte). Detalan programon vi ricevos pli poste.

Elkore invitante ni salutas vin

Organizantoj de la aranĝo

Lidia Ligęza

ESPERANTO EN GERMANAJ UNIVERSITATOJ



Esperanto ĉe germanaj universitatoj estas instruata interalie en Leipzig, Münster kaj München. En Bamberg studentoj havas la eblecon akiri punktojn por ilia studfino. "Komercaj informadikistoj devas komenci studi novan lingvon, kaj ne malmultaj pro scivolemo elektas Esperanton. Ankaŭ en Studium Generale la intereso ne malkreskis en la pasinta jardeko, 15 personojn ni ricevas por komencantaj kursoj ĉiujare," diras Martin Haase, profesoro ĉe la Departemento de latinida lingvistiko ĉe la Universitato de Bamberg.

Ĉe la Hochschule Emden / Leer (Niedersachsen) studentoj de Socia Laboro povas elekti Esperanton kaj tiel plenumi sian devon de lingvokurso. "Ni ĉiam havas almenaŭ 20 partoprenantojn. Multaj venis kiuj ne estas bonaj en fremdaj lingvoj. Post unu semestro ili parolas en Esperanto je nivelo por kiu oni kutime bezonas en la franca kvar lerneajn jarojn," diras la preleganto Sebastian Kirf.

Pli ĉe: <http://www.sueddeutsche.de/bildung/kunstsprache-esperanto-bruecken-bauen-1.2854062-2>

El Sueddeutsche Zeitung, 12. Februaro

INTERLINGVISTIKA SESIO DE UAM



Milda februara vetero akceptis la persistajn partoprenantojn de 4-a interlingvistika sesio en la pozdana universitato (30.01-05.02.2016). Ne nur komence, en septembro 2014 la grupo estis rekorda, sed ankaŭ nun ĝi estas tia: 17 studentoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando kaj po unu el Belgio, Ĉeĥio,

Kroatio, Rusio, Serbio kaj Svedio) progresas en siaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Ĉi-jare d-ro Ulrich Lins, aŭtoro de La danĝera lingvo prezentis la movadhistorion de Zamenhof ĝis post la dua mondmilito kun multaj interesoĵoj. La aliajn tri kursojn gvidis prof. d-ino Ilona Koutny envolvante la gestudentojn en diskutojn kaj ludojn. Kadre de aplikata lingvistiko temis pri leksikografio, lingva planado, multlingvismo kaj denaskismo ĝis pri komputa lingvistiko. Kontribuis ankaŭ d-ro Marc Bavant pri terminologio kaj prof. d-ro Zbigniew Galor pri lingvo kaj socio.

La tria semestro de esperanta gramatiko prilumis la riĉecon de esperanta leksiko inklude frazeologiaĵojn kaj tiklajn punktojn de vortfarado. Ilona Koutny traktis la problemojn de lingvotavoloj, skizis la evoluon de esperanto kaj la lokon de Esperanto laŭ lingvotipologio. Enkadre de pragmatiko, preskaŭ neesplorata tereno koncerne esperanton, okazis diskutoj pri kutimoj de lingvouzo (alparoloj, petoj kaj aliaj ĝentilecformoj) serĉante normojn kaj limojn de komunaj scioj kaj eblaj supozoj en internacia parolkomunumo.

La merkreda komuna vespero estis bonetosa: ni aŭdis tradukitajn poemojn de Suso kaj kantojn de Suzana, krome informojn pri la elementa lernejo, kie komenciĝis instruado de esperanto kunlabore kun la Interlingvistkaj Studoj. Post la sesio, sabate okazis ekskurso al Vroclavo, kiu estas ĉi-jare eŭropa kultura ĉefurbo kaj gastos IJK-n. Lokaj esperantistoj kaj partoprenantoj de la universitato de la tria aĝo akceptis kore la grupon.

Ilona Koutny

EVILDEA – RICHARD DELAMORE – LA PLEJ AKTIVA KAJ STULTA ESPERANTO-JUTUBISTO



“Saluton al ĉiuj! Jen Evildea, via dio!” Tiel komenciĝas ĉiuj videoj de Richard Delamore en lia YouTube-kanalo en Interreto. Sub la kromnomo Evildea (kunmetaĵo por Evil [malbono] kaj Idea [ideo]), la 29-jara aŭstralia esperantisto praktike ĉiutage afiŝas novan videoblogaĵon. En la videoj li parolas pri diversaj aferoj, pri la lingvo kaj Movado, sed ankaŭ pri sia propra vivo, siaj pensoj, inter aliaj

stultamuzaj videoj: <https://www.youtube.com/user/Evildela>.

Richard apartenas al nova generacio de esperantistoj, kiuj lernis Esperanton per Interreto (li memlernis per lernu.net) kaj por kiu la uzado de novaj teknologioj multe gravas por kreskigi la komunumon ĉirkaŭ la lingvo. Laŭ li, tiu teknologio estas malbone uzata de la Movado kaj rezulte Esperantujo vere suferas pro granda manko de filmita materialo en kaj pri Esperanto.

Lia trafa konkludo:

Esperantistoj devas esti pli progresemaj rilate la artojn kaj sciencojn ol la cetero de la mondo. Tio ne estas facila tasko, sed ĝi estas la sola vojo antaŭen. La problemo estas, ke la plejparto de Esperantujo rigardas la orajn jarojn de la frua movado sen serioze konsideri kaj utiligi la ilojn de la moderna mondo. Ekzemple, mi certas, ke vi ĉiuj aŭdis la anekdotojn de la avo, kiu demandas sian nepon por asisti pri teknologiaj problemoj. Ni devas ĉiam turniĝi al la plej junaj membroj de nia socio por vidi la vojon antaŭen. Ni devas esplori kaj utiligi la tendencojn de la junularaj movadoj ekster Esperantujo.

Sukcesegojn al li! La E-movado nepre bezonas tiajn aktivulojn.

Laŭ artikolo en Kontakto

Germain Pirlot

ASEMBLEO DE LA ASOCIO »AMIKOJ DE CDELI«

La asembleo okazos sabaton, la 5-an de marto 2016, ekde 10h30 en la Biblioteko de la Urbo, La Chaux-de-Fonds.

Prelegantoj kaj temoj de la kultura programo:



1. Claude GACOND, kreinto (i.a.) de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), prezidanto de la Asocio Amikoj de CDELI: Ĉu esperanto progresis?
2. Mireille GROSJEAN, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj kun-prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES): ILEI, tutmonda Ligo kun gigantaj taskoj
3. Nicole MARGOT, vicprezidantino de la Internacia Komitato por Etnaj

Liberecoj (IKEL) kaj redaktisto de la revuo Etnismo: Pri Etnismo kaj etnaj liberecoj La prelegtekstoj aperos en venonta eldono de la *Kulturaj Kajeroj de la Asocio Amikoj de CDELI*: <http://www.cdéli.org/kulturaj-kajeroj/>

Stefano Keller

REJUNIGO DE LA MOVADO

Jen interesa elĉerpaĵo el la raporto pri la Junulara Esperanto-Semajno, kiu okazis en Eger, Hungario, de la 25-a de decembro 2016 ĝis la 3-a de januaro 2016:

...La duolingvo-aj lernantoj, kiuj ĉeestis ja ne fizike, sed tamen en la menso de la partoprenantoj, estas foje glorataj kiel la savantoj de movado mortonta, do ĉu ebla solvo por la aĝproblemo? Ne nur la membronombroj per si mem, sed ankaŭ la aĝdistribuo de la membraro de UEA estas zorgiga; anoj en TEJO-aĝo (do sub-30-jara) konsistigas 8% de la membraro, same grandan eron konsistigas homoj pli ol 80-jaraĝaj. Laŭ la vortoj de Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA kaj kungvidanto de la seminario, temas do pri “asocio aktive perdanta sian kapablon pluivivi sin”.

Germain Pirlot

MALKOVRU LIGURION PER VELA BOATO

Kvintaga ŝipvojaĝo, de la 1-a ĝis la 5-a de junio 2016, tra la Golfo de Ĝenovo, vizitante Portofinon, Sestri Levante kaj la Kvin Landojn. La “Grupo Esperanto-Tigullio”, ano de Itala Esperantista Federacio, kunlabore kun Vela Asocio “Flaga Nodo” organizas veladon por esperantistoj en la pitoreska marborda regiono de Ligurio (nordokcidenta Italio). Ni velados admirante de la maro la plej tipajn vilaĝetojn de la Riviero kaj ĝiajn mirindajn naturvidaĵojn. Estos ŝanco por renkonti novajn geamikojn esperantistajn ene de la emocia nekutima kadro de la velkrozado. La jahtestro estas longasperta itala velisto, ano de Grupo Esperanto-Tigullio kaj parolas Esperanton.

Ni faros etapon en Chiavari, kie ni havos eblecon renkonti aliajn membrojn de Grupo Esperanto-Tigullio, kaj vespermanĝi kune.



La partopreno estas malfermita al ĉiuj kaj velistoj kaj novicoj. Ĉiu partoprenanto havos la eblecon piloti la jahton kaj praktiki la velŝipajn manovrojn. Estas necesa la kunlaboro de ĉiuj por la navigado, la albordiĝo kaj la kuirado; tamen ne estas bezonata antaŭa sperto pri velŝipado.

La programo:

- Alveno en Ĝenovo merkredon la 01-06-2016 per individua veturado.
- Renkontiĝo kaj enŝipiĝo en Antikva Haveno de Ĝenovo merkredon la 01-06-2016 je la 18:00 horo.
- Enloĝiga aranĝo en jahto 11-13 metra, kun 3-4 kajutoj, 8-10 kuŝlokoj, 1-2 necesejoj (vidu bildojn sube).
- Rapida aĉetado ĉe superbazaro por proviantaĵoj.
- Mallonga leciono por ekkoni la jahtan rigilaron.
- Tranoktado sur la jahto en du-kuŝlokaj kajutoj (ĉiuj tagoj).
- Ĵaŭdo matene: malankriĝo kaj velado al Chiavari, kun dumvoja vizito al la fama Abatejo de San Fruttuoso.
- Takadoj, subventaj ĝiradoj, boardoj, bulenoj kaj aliaj emociaj velaj manovroj.
- Tagmanĝo en la jahto dum navigado aŭ ankrite (ĉiuj tagoj).
- Ĵaŭdon vespere: ŝnurfiksado en haveno de Lavagna kaj renkonto kun esperantistoj de Grupo Tigullio, por vespermanĝo kune en restoracio.
- Vendredon: velado direkte al Sestri Levante ĝis Vernazza (dua el la famaj “Kvin Landoj”).
- Sabaton: reen-velado al Golfo de Tigullio, vizito al la fama Portofino kaj tranoktado enjahta en Santa Margherita.
- Dimanĉon: reveno al Ĝenovo, kun dumvoja vizito al la marvilaĝo Camogli.
- Elŝipiĝo dimanĉon la 05-06-2016 proksimume je la 14:00 horo, aŭ alia taŭga horo por la flugo.
- Reveno al propra lando dimanĉon posttagmeze aŭ vespere per individua veturado

Prezo: 280 € por persono.

La prezo inkludas: luadon de la jaĥto kaj Jaĥtestro.

La prezo ekskludas: vojaĝelspezojn por atingi la jaĥton, Komunan Kason, Kaŭcion, Asocian/Asekuran Karton.

Komuna Kaso: dependas de kiom ni trinkos... (ĉirkaŭ 120 €)

Nombro minimuma de partoprenantoj: 6.

Jen la lokoj kien ni navigos...



... kaj jen la jaĥto:



Alessandro Mazzetti

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 29-an de februaro 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Bero Ŝuman, Elisabeth Lambert, Ilona Koutny, Lidia Ligeza, Germain Pirlot, Stefano Keller, Alessandro Mazzetti

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

